Fontaura

# Liberecanaj vivkonceptoj pri soci-organizado

eldonita de Liberecana Frakcio
de S.A.T. en 1970
(2a eldono, 1975)

Aldone : "En anarkista socio, kiel kondutos la individuo ?"
(artikolo de Johano G R A V, 1919)

Suplemento
de
La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
106 B 1975 1,25 FF

Fontaura

# Liberecanaj vivkonceptoj pri soci-organizado

eldonita de Liberecana Frakcio
de S.A.T. en 1970
(2a eldono, 1975)

---

**Aldone** : "En anarkista socio, kiel kondutos
la individuo ?"
(artikolo de Johano G R A V, 1919)

Suplemento
de

La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
106 B ✿ 1975 ✿ 1,25 FF

## Liberecana Frakcio de SAT

Celoj : Propagandi kaj aplikadi Esperanton en la liberecanaj medioj; diskonigi anarkismon per esperanto.

Organo : "Liberecana Ligilo"

Eldonis : La Liberecana Penso ... 1,25 FF
Liberecanaj vivkonceptoj ... 1,25 FF
La ŝtato masakras (pri Valpreda-afero)
La Anarkiistoj (S. Faure)
Pripensoj pri Anarkiismo (Fayolle)
(Tiuj 3 lastaj tekstoj aperis en L.L.)

Krome liveras : La Liberecana Socio (Bastjan)

### En la broŝura serio de LJP :

- Alveno de abundo kaj konsumsocio (PV.Berthier) ... 0,75 FF
- Eduko kaj vivsignifo (Krishnamurti) ... 1,50 FF
- Memvola servuto (La Boesi) ... 1,25 FF
- Anarkio kaj organizo (Malatesta) ... 1,25 FF
- La Rajto de Pigro (Paŭlo Lafargue) ... 1,50 FF
- Durruti, simbolo de la hispana revolucio ... 1,25 FF
- La Piramido de l'Tiranismo (Nieuwenhuis) 1,25 FF
- Civila Malobeemo (H.D. Thoreaŭ) ... 1,25 FF
- Individuista Manlibreto (Han Ryner) ... 1,50 FF
- Ĉu revolucia registaro... aŭ anarkio ?
 \+ Anarkista agado en la revolucio (Kropotkin) ... 1,50 FF

ĉe : La Juna Penso, F 47340 Laroque Timbaut
poŝtkonto : 3 374 04 M, Bordeaux, Francio.

---

### Alies eldonoj :

- Al la Junuloj (Kropotkin)
- Fronto kaj postfronto de Aragonio (A. Prats)

## Liberecanaj vivkonceptoj pri sociorganizado

Ĉiuj samideanoj kaj ĝenerale ĉiuj esperantistoj, kiuj legis nian unuan broŝureton, "La Liberecana Penso", publikigitan okaze de la kongreso de SAT en Novi-Sad (Jugoslavio), jam konas nian celon, t.e. diskonigi niajn fundamentajn ideojn pri la nuntempa socia vivo en klara, simpla kaj mallonga formo; prezenti al legantoj elektitajn pensojn, el la plej konataj pensuloj, kiuj honoras nian idealon.

En "La Liberecana Penso" ni intencis esprimi : opinion de la liberecanoj pri ŝtato kaj libero; ideojn pri moralo kaj homa feliĉo; kion prezentas al ni laboro kaj sindikatismo; pensmanieron pri religioj kaj ĝenerale ĉiuj superstiĉoj; vidpunkton rilate al la milito kaj la militismo. Pri la seksaj temoj ni prezentis opiniojn koncerne amon kaj geedzecon; ni diris nian opinion rilate al la politiko kaj al ĉiuspecaj politikuloj. Entute resume ni prezentis aron da ideoj, kiuj, konvene pripensitaj kaj disvolvitaj, estas la fundamento de nia ideologio.

Sed se teorio estas afero, alia afero estas praktiko, reala disvolvado por efektivigi idealon. La ideoj, kiel ajn belaj kaj bone pensitaj ili estas, se oni ne povas realigi ilin, estas nur utopiaĵoj; kaj ni, liberecanoj, ne nutras nin spirite per utopioj. Ni estas realistaj kaj ŝatas stari sur certa bazo, sur firma tereno. Pro tio ni ankaŭ emas atentigi la konstateblajn faktojn.

Cele prezenti al leganto la realigojn, la praktikadon de niaj ideoj, ni klarigos en tiu dua broŝuro travivitajn spertaĵojn (serĉesploroj kaj studlaboroj). Ni titolas ĝin "Liberecanaj Vivkonceptoj pri Sociorganizado" ĉar vere temas pri nova revolucia vivkoncepto pri civilizacio, pri signifo de la liberecana komunismo. Tia komunismo estis multaspekte realigita en la ukrajnaj komunumoj de la rusa revolucio de 1917, kaj, ĉefe, pli grandskale en revolucia Hispanio de

1936, kiam oni kreis la kolektivojn kaj kiam, en la ekonomia vivo de la regionoj, kie ne regis la faŝismo, grave imponiĝis la socialigoj.

Citinda ekzemplo estas la revolucia kaj konstrua agado en Soveta Rusio, dum la unuaj tempoj, ankaŭ dum la periodo de milito kaj revolucio. Ekzemplo, kiu enradikiĝis en Hispanio sed estis dronigita de la hispana-itala-germana faŝismo, kaj de la senkuraĝa pasiveco kaj senkonscio de la laŭdire demokrataj nacioj. Tamen, eminenta sociologo kaj liberecana verkisto, Gustavo Landauer, jam diris : "Ellaborado de socia transformado povas esti realigita en nia nuntempa socio; ĝi povas trovi taŭgan medion favoran en la ĉiutaga vivo ne atendante, ke en la Historio okazu tagoj de socia kaj sanga konvulsio".

Kiel pruvojn de niaj asertoj ni citos la belegan ekonomian organizadon de la izraelaj kibucoj, la produktajn kaj konsumajn kooperajn asociojn, kiuj ekzistas en Svedio, samkiel en Francio kaj en diversaj aliaj landoj. Estas konstateblaj pruvoj, ke oni povas vivi fratan etoson de vigla kamaradeco, for de la abomeninda interhoma ekspluatado. Oni povas krei novan mondon, kie la individuo ne devige laboru por riĉigi aliajn; kie la homo ne estu simpla roboto en la ĉenoj de la kapitalisma sistemo, kaj kie la intelektuloj ne estu kunkulpuloj de tiel malnobliga socia stato.

Estas evidente ke, por agi en la direkto de vera morala kaj materiala elservutigo, oni nepre havu jam firman koncepton pri tio, kion oni volas; estas necese posedi evoluintan konsciencon, fundamente kompreni la homan dignon. Tiu necesa etiko, bazo de nia ideologio, estas jam delonge disvolvigita per gazetoj kaj revuoj de la liberecana movado, kiel fundamenta teorio.

Estus kuraĝige, se nia Liberecana Frakcio sukcesus plinombriĝi kaj se ni povus, en la universala esperantistaro, estigi niajn ideojn kvazaŭ lumturo, kiu disradiu la konceptojn pri justo kaj libero. Tiam per helpo de gazetoj kaj revuoj, kaj per libro-eldonado, nia modesta laboro povos atingi, grandskale, disvastigon, kiun ĝi meritas.

## Utopioj en Historio

De multaj jarcentoj la ĉiuspecaj premoj, maljustaĵoj, kontraŭ popolamasoj fare de potenculoj, nobeluloj, riĉuloj, ŝtatestroj, fariĝis kvazaŭ nekuracebla plago; sed feliĉe, malgraŭ fatalisma akcepto de malkleraj popolamasoj, kontraŭ homekspluatado ribelis malplimultanoj. Kvankam instigitaj de nobla sento de emo al pli justa mondo, ofte senbride ili reagis, uzante eĉ senesperan perforton kontraŭ la tiamaj subpremantoj.

Samtempe kun tiuj revoluciuloj, liberalaj verkistoj konceptis, skizis justan, fratan sociorganizadon, realigeblan en la tuta mondo. Tiujn pionirojn, tiujn klerulojn oni ĉiam nomis utopianoj, t.e. revemuloj, viziuloj, mallogikemuloj ktp.

Dum blovas renoviĝanta aero, elpunktas profetoj, la plej gravaj el hebrea literaturo : Oseo, Amono, Jesaja. Ankaŭ en kristanismo, Sankta Aŭgusteno, klera elemento, fariĝas aŭtoritatulo, superas ĉiujn antaŭajn pensulojn kaj tre detale starigas skemon de nova homorganizado. Famon li konis pro sia ĉefverko "La Urbo de Dio".

Platono, disĉiplo de Sokrato, elreliefiĝas el la eminentaj pensuloj de Antikveco. En sia verko "La Respubliko", li disvolvas sian socikoncepton : strukturigi suverenan ŝtaton aristokrateman, kies rolo estus severe reguligi, laŭ sociaj klasoj hierarkiigitaj, la oficojn de ĉiuj membroj.

Eble, de tiu platona sistemo estas studintaj nun nur kelkaj detaloj rilate edukadon, ĉar intertempe aliaj "utopioj" montriĝis pli perfektaj koncerne socian egalecon.

Ni menciu "Utopio"n de la anglo Tomaso More; la verkon de Johano Wyclife, kiu sugestas komunismon kun religia bazo; lian disĉiplon, Johano Balle, kiu prezentas doktrinan manifeston saturitan de ribelo; la "Nova Atlantido" de Francisko Bacon, kiu okazigis viglajn komentojn inter la tiamaj liberaluloj; la "Civito de l'Suno" de Campanella; la "Oceano" de

Havungton ktp, inter la multaj priskriboj pli malpli realistaj, kiuj, formulitaj dum la XIVa, XVa, XVIIa jarcentoj, instigis al progresema pensado.

Kiel sciate, ĉefe dank'al la verkaro de enciklopediistoj, estiĝis la franca revolucio. D'Alembert, Voltaire, Rousseau, diskonigis klerigajn lumojn. Gravan breĉon kaŭzis tiu revolucio al la tiama feŭda sistemo, kies aristokratio ĝuis hontindajn privilegiojn. Sed profite al burĝaro stariĝis nova klaso, kiu ĉiel malebligis konkretigon de jura, ekonomia kaj efektiva egaleco por ĉiuj. Aliforme daŭris plu la antaŭaj maljustaĵoj. Unuvorte la nuraj ŝanĝoj okazintaj estis, ke burĝoj anstataŭis aristokratojn kiel ekspluatantoj. Kaj daŭris profunda mizero de popolanoj. Denove estiĝis homoj, kiuj ne akceptis tiun staton kaj dum la XIXa jarcento abundis verkoj, kiuj difinis socisistemojn por anstataŭigi anakronismajn reĝimojn. Rimarkinde estas, ke tiujn teoriojn ne nur oni skizis sur libropaĝoj, sed plie oni provis vivigi, realigi, konkretigi ilin. Cabet, Saint-Simon, Enfantin, Fourier, Ludoviko Blanc, Roberto Owen, heredigis al ni vastan, varian kolekton da utopioj, da projektoj pri novaj sociorganaj konceptoj. En tiuj verkoj, kompreneble, kuŝas parto da fantazio, sed ankaŭ granda parto ĉiam efektivigebla.

El tiu epoko, malgraŭ forpasintaj jaroj, elstaras du eminentaj pensuloj : Godwin kaj Proudhon, en kies verko speciale liberecanoj multe ĉerpis siajn konceptojn pri sociorganizado.

Sian evoluon al pli inda vivo, la homaro ŝuldas al tiuj utopiuloj, revuloj, idealistoj. Nur ili kuraĝis denunci fronte hontindan kaj daŭran ekspluatadon de homo far homo, nur ili reagis kontraŭ fatalisman konsenton de amaspopolo al tiu sklaviga stato pro neklereco aŭ malkuraĝeco, nur ili rifuzis akcepti kiel eternaj vivformojn kadukiĝintajn kaj difinis sekvindajn vojojn al pli frateca homa socio.

Mondfama verkisto, Anatolo France, majstre diris : "Nuntempaj utopioj fariĝos estontaj realigaĵoj".

Malgraŭ la reduktita amplekso de ĉi tiu broŝuro, ni intencas doni skeman ideon pri tio farita kaj farota koncerne homan liberigon. Ni, liberecanoj, opinias nenecese elpensi ĥimeraĵojn kaj, kion ni raportas, tio estas fundamentaj ideoj kun realaj konstateblaĵoj.

Tra la mondo, de jarcentoj,
homoj strebas al libereco

Ja ne povas mirigi nin la fakto ke inter la homoj ekzistas kaj disvolviĝas emo al komunuma vivo libera, kiam ni rimarkas, ke en multaj bestospecioj, eĉ ĉe la plej malevoluintaj, oni konstatas sociordigitan komunuman vivon, kies ekzemploj estas tiom instruigaj por la homoj.

Aparte gravas konstati la fakton ke, ekde pratempoj, ĉe laboremaj popoloj ne posedantaj iujn ajn kulturajn influojn aŭ t.n. librokonojn, ĉiam ekzistis tiu vigla frata sento, de reciproka interhelpo, sento kiun oni retrovas ĉe kamparanoj de iuj regionoj el vastega Rusio kaj pri kiu Kropotkin verkis majstrajn librojn.

Kaj estas evidente, ke tiu emo al komuna laboro, al frata kaj solidara agado povas ofte ŝpruci kvazaŭ instinkte kaj neatendite. Jam de antaŭ jarmiloj, en Ĉinio, pri ĉio koncernanta kamparajn taskojn oni starigis komunan laboron, kiu cetere eĉ nun estas la bazo de la landa ekonomio. Gravan rolon havis, antaŭ kelkaj jardekoj, la ĉinaj kamparanoj, ĉar ilia produktiva agado estis impulsa forto, kiu ege helpis la triumfon de la ĉina revolucio. Al tiuj, kiuj pretendas, ke Maŭ Zedong estas la iniciatinto de tiu sistemo de komunuma grandekspluatado - sistemo, kiu multobligas la produkton kun malpli da klopodoj, kompare al individua laboro kaj kies rezultoj en la nuna Ĉinio estas atentindaj - ni diru, ke tiu sistemo ne estas novaĵo en lando, kie oni spertis ĝin de jarmiloj. Tute ne necesaj estis la trudaj kaj centralizaj ordonoj de "komunistoj". Jam, antaŭ jardekoj, la fama geografo Elizeo Reclus, en sia ĉefa verko "Universa geografio",

substrekis la fratan spiriton ekzistantan inter ĉinaj kamparanaj amasoj, kiuj de jarcentoj batalis kontraŭ la inklino de feŭdaj landsinjoroj tiamaj trudi centralizemon. Nuntempa Ĉinio daŭre konas saman situacion, kie alternas teruraj centralizitaj trudlaboroj kaj apudaj laboraj aŭtonomioj.

Menciinda ankaŭ estas la tre grava emo al komunuma vivo, enradikiĝinta en Hindio. Gandhi kaj lia disĉipla daŭriganto Vinoba klopodis disvastigi ĉe produktemaj popolanoj, suferintaj pro daŭra mizero prapatra (kies kaŭzoj grandparte estas tro granda popolnombro), praktikadon de konstanta reciproka helpo, hereditan de antikvaj kutimoj. En la nuntempa Hindio oni disvolvas tiun mirindan taskon subnomo "Gramdam", laboro, kiu estas ege simpatiinda. Kunlaboranto de Vinoba freŝdate deklaris publike : "Kelkaj vilaĝoj el la distrikto Darbhange komune konstruis vojojn, kanalojn, digojn; la vilaĝanoj inter si pace finaranĝis siajn disputojn kaj demetis plendojn el tribunaloj; ili deponis kvaronon el siaj rikoltoj en grenobankon kaj, ĉiesvoĉe, elektis administran komisionon de komunuma banko".

Tiuj sociaj vivformoj ebligas plibonigon de vivo, per humanaj kontaktoj forlasantaj egoisman izoliteconĉiurilate kontraŭan al vera socivivo.

Joakimo Kosta, elstara hispana ekonomiisto kaj sociologo, skribis ampleksan verkon "Agrara kolektivismo". Per trafaj dokumentoj li pritraktas la kontribuadon de diversformaj laboroj komunumaj, disvolviĝintaj dum jarcentoj en Iberio : komunumaj kamparlaboroj; justa dispartigo de la produktoj; komuna bredado de brutaro, ŝafaro ktp, prizorgata de urbestraranoj; egalrajtaj dispartigoj de ĉiuj avantaĝoj por ĉiuj komunumanoj.

Pli malpli grandskale oni povus prezenti multajn aliajn konstateblajn realigojn de kunvivado kun popola origino. Ili pruvas, ke, apud niaj idealaj konceptoj, ekzistis kaj ekzistas, en evoluo de ekonomio, tre variaj sistemoj. Tio montras, ke tute ne utopie ni parolas pri libera laboro, sen eksplua-

ado de homo far homo, sen ŝtataj influoj. Fakte, tiu vivmaniero povas ĉerpi inspiron el enradikiĝintaj kutimoj influitaj de popola tradicio kun liberema fundo. Kaj estas fakto, ke ĉiam kapitalistoj kaj ŝtatoj dronigis en sangon revoluciojn, kiuj instigis al konkretiĝo de tiu popola emo al libera komuna vivo kaj sociorganizado. Bedaŭrinde, multe kunkulpas al malvenko de tiuj revolucioj pasiveco de la laboristaj amasoj, kiuj ne helpis decide kaj energie tiujn profundajn socirenovigadojn.

## Revoluciaj provoj

Difininte kelkajn karakterizaĵojn de teorioj pri socia renovigo, citinte kelkajn aspektojn de libera komunlaboro kaj ties popolradikojn tra historio de kelkaj landoj, ni devas nun pritrakti la plej gravajn provojn, konkrete efektivigitajn en Eŭropo, sekve de revoluciaj impulsoj.

Ne forgesinda, pro sia historia graveco, estas la Pariza Komunumo, terure sangdronigita post sia malsukceso, kaj rilate al "sociologio de revolucioj" estas unuarange studinda la rusa revolucio, ŝprucinta kiel vulkano en la jaro 1917a. La plej freŝdata ekzemplo estas la hispana revolucio en 1936a, ĉar pri ĝi oni posedas, ĝis la plej etaj detaloj, la plej gravan kaj instruigan dokumentaron rilate al efektiva praktikado de komuna, libera socivivo. En tiu ĉi, forigitaj estis la ŝtataj kaj kapitalismaj ekspluatado kaj paraziteco.

Draste, pro spacomanko, en ĉi tiu broŝureto ni resumos realigojn, konkretigojn, kiuj bezonus milojn da paĝoj kaj ni esperas atingi per tiu modesta laboro nian celon, t.e. : instigi niajn liberecanajn kamaradojn esperantistajn pli profunde serĉesplori, en la respektivaj landoj, kie ili vivas, la temojn nur skizitajn. Estos ankoraŭ pli trafe, se nia movado, pro granda ampleksiĝo de sia anaro, povos eldoni en esperanto gravajn verkojn pri tiuj temoj disvolvigendaj en la tuta mondo.

Parizo-komunumon gvidis kleraj gravuloj, kies sindonemo kaj emo al justeco estas laŭdindaj : Luiza Michel, Varlin, Delescluze kaj tiom da aliaj, ke ne-eblas ĉiujn nomi. Kiel diris Lisagaraj en sia "Historio de Komunumo de 1871", kiel evidentigas tion Koechlin en sia verko "Ideologioj kaj tendencoj en Pariza Komunumo", tiuj gvidantoj klare konceptis pri tio tuj efektivigebla por starigi socivivon tute liberan, justan kaj komplete diferencan de la tiutempa burĝa ekspluatado. Sed diversaj kontraŭaj kaŭzoj : sieĝo far malamikoj ĉiuspecaj, malvasta agadkampo, mallonga ekzistado, ktp, malebligis realigi multajn konkretaĵojn laŭ ekonomia vidpunkto. Varstokoj rapide reduktiĝis, oni porcilimigis varojn, manĝaĵojn kaj produktojn, kaj tamen daŭre vigla restis la forofera spirito de komunumanoj. Tion aparte montras la sindonemo de tiuj homoj, kiuj sur barikadoj, ne manĝinte dum tagoj, kuraĝe defendis ĝis siaj lastaj fortoj sian revolucion.

Ve ! Tiel frue okazis reago kaj subpremado far reakcio, ke ne eblis al komunumanoj normaligi administradon kaj vardistribuadon, kiuj dum la mallonga vivo de la Pariza komunumo atingis gravan amplekson. La finon ni konas : en la sangoriveron de ĝiaj defendantoj estis dronigita unu el la plej elstaraj konkretiĝoj de komunumaj, liberaj, sociorganizadoj.

Menciinda estas en historio de la Rusa revolucio, la ukrajna ribelo, ĉar grandparte dank'al tiuj ribeluloj postvivis tiu revolucio. La ukrajnaj kamparanoj helpis la bolŝevistojn kontraŭ cara armeo ekde la komenco. Sed ili, kiuj sindoneme batalis por forigi miljaran homservutecon kaj hontindan ekspluatadon, ekrimarkis, ke la bolŝevista venko nur alportus al ili pli tiranajn estrojn ol la malnovajn. Ruĝa diktaturo de la novaj estroj agadis kontraŭ laboristaj sindikatoj, anarkistoj, liberaluloj, ktp, kiuj kuraĝis rimarkigi la maljustaĵojn de la nova reĝimo. Inter tiuj ukrajnaj kamparanoj troviĝis rimarkinda ribelulo : Nestoro Makno. Dank'al lia iniciatemo, fulmrapide ribelo disvastiĝis tra ukrajnaj vilaĝoj ne delonge liberigitaj el jarmila sklaviga servuteco; ribelaj kamparanoj detruis

arkivojn pri terposedoj, kunigis siajn terpecojn por komunume kulturi ilin, interŝanĝis siajn terproduktaĵojn kaj starigis sistemon de reciproka interhelpo. Sed, hontinde reagis bolŝevistoj. Pli ol venki la carajn reĝimentojn de Wrangel kaj Denikin, ili celis ŝanceli la verajn revoluciulojn, nome la armitajn kamparanojn, kunulojn de Makno, inter kiuj troviĝis cetere anarkistaj intelektuloj kiel Volin. Kaj veinde ! la popolaj fortoj de la kamparana ribelo, kiuj celis starigi vivreĝimon sen centraliza tiraneco de la ajn partio, estis venkita.

## Trafa konkretiĝo de senŝtata sociorganizado

Kiam faŝistaj fortoj en Hispanio, interkonsentinte kun Hitler kaj Musolini, sturmis Respublikon, laboristaj amasoj ne dubante pri la sorto,kiun oni intencus trudi al ili, tuj organizis rezistadon. Jam de kelkaj jaroj antaŭ la faŝista ribelo, la sindikato "Nacia Laborista Konfederacio" (C.N.T.), kaj la Anarkista Ibera Federacio (F.A.I.) enkondukis intensajn kampanjojn per mitingoj, prelegoj, serion da artikoloj en gazetaro liberecana. Tiuj kampanjoj celis klarigi kaj proponi iniciatojn pri liberecana komunismo, t.e. : starigo de socia reĝimo kun ekonomia strukturo vere komunisma, forigo de la trudema rolo de ŝtato por eviti, ke burokrataro fariĝu nova neeksigebla klaso. Dum la franca proletaro okaze de ĝenerala striko en majo 1968, pro inerteco, ne kapablis efektivigi veran revolucion tuj eblan kaj realigi kontrolon far laboristoj de fabrikoj, kaj memmastrumadon, tute ne same agis en 1936 la laboristaro en Hispanio. Ĝi rapide decidis kapti ĉiujn produktrimedojn. Tiuj laboristoj proprigis al si fabrikojn, laborejojn, bienojn kaj konstruaĵojn. La memadministradon de fabrikoj kaj bienoj realigis laboristoj kaj teknikistoj, demonstrante per tiu revolucia agado la krean povon de la produktistoj. Ili prenis multajn iniciatojn, celante pliboniĝon de la produktado. Malegalecon pri produktado kaj sa-

lajraj ebloj ili provis eviti per socialigoj kaj disvolviĝis egaleca etoso inter la industriaj firmoj, iuj prosperaj, aliaj modestaj. Egalecon pri rajtoj kaj devoj oni realigis, kunigante produktojn de diversaj kolektivoj kaj per salajra sistemo starigita de kolektivanoj mem okaze de periodaj kunvenoj.

Administrantaro, en ĉiuj laborlokoj, estis elektita en ĝenerala kunsido, antaŭfiksanta deĵorperiodon. Kiam finita tiu periodo, aliaj laboristaj kamaradoj transprenis taskojn de antaŭa komisiono, tiel evitante la burokratismigon pro longdaŭra mandato. Produkto-distribuado, interŝanĝo de varoj, materialo, ktp, eksportado, ĉio, kio eksteris komunuman vivon, estis prizorgita de ĉiu urbkonsilantaro, de respondeculoj, kiuj transprenis administrajn funkciojn kaj ankaŭ estis elektitaj de popolo por efektivigi sian laboron. Pri la tuta socia vivo respondecis manproduktantoj kaj teknikistoj, ĉar, samtempe, ili prizorgis revoluciajn ŝanĝojn kaj batalis kontraŭ la faŝistaro hispana-itala-germana. En tiu epoko, produktado estis streĉe intensigita. Dum la junularo sinoferis sur la frontoj, en postgvardio estis plej grandparte la virinoj, la maljunuloj kaj eĉ la infanoj, kiuj strebadis al ĉiuj laborproduktaĵoj. Apudfronte, tamen, milicanoj ĉiam kiam eblis flankenlasis armilojn kaj prizorgis kampkulturon. Kiel dirite, tre variaj estis la manieroj organizi kaj administri kolektivajn aktivecojn kaj ankaŭ trafajn socialigojn.

Unu el la plej citindaj estis tiu, kun aŭtentika liberecana-komunista karakterizaĵo, efektivigita en Aragona regiono, kompreneble en la lokoj, kie faŝistoj ne superregis ĉe la komenco de sia ribelo. Dum en la aliaj regionoj, kolektivoj plu uzis monon en iuj lokoj, kaj kuponojn aliloke, por anstataŭigi monon, en Aragono oni sukcesis komplete forigi monon kaj monuzadon. Ĉiu urba konsilantaro enhavis en siaj magazenoj ĉiutagajn produktojn. En tiujn magazenojn venis vilaĝanoj por preni ĉion, kion ili bezonis por si mem aŭ por sia familio kaj necesis nur prezenti

karton de produktanto, kiun posedis ĉiuj manlaboristoj (kamparanoj, masonistoj, lignaĵistoj, kombistoj, k.a.) kaj teknikistoj (inĝenieroj, kuracistoj, arkitektoj, ĥemiistoj, k.a.). Dispartigo de abundaj produktoj ne estis limigita, kaj malabundajn oni disdonis unue al malsanuloj, maljunuloj, infanoj. Ĉar Aragono estis regiono esence agrokultura, krom la produktoj uzataj por bezonoj de la komunumoj, estis troaj produktoj, t.e. greno, oleo, vino, sekaj fruktoj, k.c. Transportservoj veturis tiujn troajn produktojn de kampoj al industriejoj de Katalunio por interŝanĝi ilin kontraŭ ŝtofoj, maŝinoj, ŝuoj, kaj aliaj industriaj produktaĵoj. Resume, ĉiu produktanto havigis al si kion li bezonis, sen iu ajn neceso kaj uzo de mono absolute forigita de la ĉiutaga vivo.

Por ne tro plilongigi tiun ĉapitron, oni nur resume aldonu, ke, malgraŭ nenombreblaj malfacilaĵoj, ĉiuj laboroj, koncerne sanecon kaj kulturon, estis tre akurate prizorgitaj. Kaj oni ne forgesu diri, ke malamikoj staris ne nur sur frontoj sed ankaŭ en la sino de kolektivoj, kie ili plejeble provis malebligi laborojn, produktadon, kaj kie ili provis krei psikan etoson de malfido kaj malvenko.

El tiu revolucia epoko, kies pruvoj pri spertoj travivitaj kuŝas en miloj da gazetoj, libroj, revuoj, manifestoj, atestantaj la efektivigaĵojn, la sociajn realigaĵojn, oni povas multe eltiri por objektive pristudi realigon de libera sociordo sen centralizado. Eminentaj pensuloj, historiistoj, sociologoj, ktp, plu studas tiujn valorajn spertojn praktike travivitajn.

Kaj, feliĉe, multaj partoprenintoj de tiu hispana revolucio vivas ankoraŭ.

## Alia menciinda sistemo de memstara sociorganizado : la izraela kibuco

En ĉi tiu verko nepre necesas mencii tiun sociorganizadon, kiun Klara Malraux, en sia interesa verko pri izraeliaj kolektivoj, nomas "kibuca civilizacio". Multaj verkoj jam pritraktis tiun sistemon, kiu montras triumfon de volo, ĉar, fakte, streĉa laboro naskis el neproduktema grundo, el negastema dezerto, mirindan sistemon de kunvivado.

Pripensigaj estas diroj de unu inter multaj vizitintoj, kiu deziris travivi tiujn ĉiutagaĵojn kun kibucanoj mem kaj partopreni iliajn laborojn : "Agrokulturo en la kolonioj alprenas diversajn aspektojn kaj kamplaboroj varias laŭ klimataj kaj geografiaj kondiĉoj, ĉar abundeco aŭ manko de akvo grave influas ilin. Ĝenerale tiaj kolonioj prizorgas laktan industrion, ŝaf- kaj kokinbredadojn, kulturon de greno, furaĝo ktp, plantadon de vitoj, olivarboj, fruktarboj, legomkulturon kaj hortikulturon. En Jordanvalo oni kulturas bananojn kaj daktilojn".

Al tiuj klarigoj, Baratz, kiu multe strebadis al sukceso de kibuco, aldonas tiun precizan difinon : "Kibuco ne konsistas nur el asocianoj, nur el partianoj grupiĝintaj. En ĝiaj aktivecoj ĉiutagaj ne nur temas pri realigaĵoj efektivigitaj aŭ efektivigotaj komune, ne nur temas pri akcepto, konsento rilate la principojn, sed multe pli gravas la fakto, ke kreiĝis nova etiko, kiu celas libere doni kaj ricevi, kompreni aliulojn, eliri el sia propra 'egoismo'. Jen, laŭ mi, esence nova fakto en la homrilatoj : forigo de trudaj ordonoj, ĉiesprofita dispartigo de ĉiuj riĉaĵoj, ktp".

Kaj tiujn dirojn akcentas Klara Malraux en la jam prialudita verko, kie, en ĉapitro titolita "administrado", oni legas : "Laŭ leĝa vidpunkto kibuco estas kooperativa entrepreno, kies ekonomio estas komplete aŭtonoma. Ĝi sin administras mem. Ĉe la komenco, kiam malgrandaj estis la kolektivoj, facila estis tiu ad-

ministrado. Povas esti, cetere, ke por daŭrigi tiel, la unuaj kibucanoj klopodis doni al kibuco karakteron kvazaŭ familian. Sed jam forpasis tiu epoko. Diversaj problemoj stariĝas aliel nuntempe. Temas nun viviĝi, je la plej streĉa senco de tiu vorto, komunumojn dumil-opulajn, kies multaj membroj : infanoj, maljunuloj, ktp, ne estas produktkapablaj. Tamen daŭre en kibucoj ĉiuj produktaĵoj apartenas al komunumo. Aĉetado, disvendado, laboro estas organizitaj kolektive. La kolektivo, kies neniu ano estas salajrata, respondecas pri loĝado, manĝoj, etulvartado, instruo de infanoj, distraĵoj por plenkreskuloj kaj eĉ libertempo. Ĝi same prizorgas lavadon, distribuadon de tolaĵo. Ekzistas komunaj salonoj, manĝejoj, sed ekzistas ebleco prepari sian manĝon en propra loĝejo por tiuj, kiuj preferas izoliĝi. Je la plaĉo de ĉiuj, sen malhelpo, sen iuj ajn trudoj ".

Abundas atestoj, dokumentoj, devenantaj de homoj, kiuj, dezirante forfuĝi burĝan civilizon kaj ĝiajn monajn ligilojn, alkuris al Izraelio. Plejparte, ili estas membroj de juda popolo, historie turmentita. Ĉar ili travivis vagulan vivon, estis por ili grandega ripozo, kiam ili trovis komunan hejmon, fratan amemon, kaj kiam ili kunigis siajn fortojn, volon, por la bono de ĉiuj for de premoj kaj hipokriteco, ĉiutagaj bazoj de l'socisistemo, en kiu ni vivas.

Antaŭ nelonge aperis letero de juna tajpistino, laboranta kiel sekretariino en grava komerca firmao de granda urbo el Francio. Ŝi decidis libertempi en Izraelio kun intenco travivi dum du semajnoj kibucan vivadon. Ŝi en sia firmao ĝuis altsalajron kaj estis konsiderata de la firmaestraro kiel altranga oficistino. Tamen, kiam ŝi spertis la mankon de vantaeco, la maleston de malnobligaj flatadoj, kutimaj en ŝia franca kontoro, la modestan kaj egalrajtan vivon de ĉiuj anoj, la fratan etoson, en kiu disvolviĝas ĉiutagaĵoj, ŝi estis tiom allogita, ke ŝi preferis resti kun tiuj afablaj kibucanoj, sin konsiderantaj kiel fratojn unu la alian.

Bedaŭrinde, en la momento, kiam ni redaktas tiun

ĉi broŝuron, kaj jam de kelkaj monatoj, insida minaco far arabaj ŝtatestroj riskas nuligi tiom da klopodoj de tiuj, kiuj foroferis ŝviton, energion kaj forton, por elstarigi fruktodonan kamparon el sunbruligitaj ŝtonoj. Trudiĝas al kibucanoj, al kolektivanoj, tiu fipolitika etoso kaj ili tute ne akceptas perdi la rezulton, kiu postulis tiom da peno. Fanatikaj malamikoj devigas tiujn homojn al senĉesa singardo, ĉar je iu ajn momento, ne atendite, povas alveni detruiga atako. (1)

Por ni, liberecanoj, disvolviĝo de izrealaj kibucoj estas plia konkreta pruvo, ke homoj kapablas vivi harmonie kaj pace, materiale kaj ekonomie, sen iu ajn submetiĝo al deziroj de la estroj, kaj forigi regadon de neproduktiva klaso absolute senutila.

## Produktado kaj konsumado en kooperativa sistemo

Kiel Elizeo Reclus, ni revolucianoj kaj aprobantoj de sociaj ŝanĝoj, konsideras, ke evoluo kaj revolucio nepre devas kaj povas kuniri. Kaj ni rediru, ke diversaj vojoj estas sekvindaj por atingi homliberigadon, kiu akordiĝas kun nia liberecana sinteno : Ni estas kontraŭ ĉiajn perfortecojn kaj neniu "batalis" pli ol ni por estigi absolutan pacismon. Sed, kiam liberecanoj uzis perforton, tion ili faris nur laŭ la biologia leĝo de memdefendo. Kaj ne kulpas ni sed registaro, plutokrataro, estraro, kiuj ne konsentis, ke popoloj liberiĝu el servuteco, kaj perforte sufokigis ĉiun liberan provon al nova vivsistemo.

Inter la plej famaj pensuloj, kiuj asertis, ke ne necesas atendi estontecon por realigi socisistemon liberan laŭ anarkia agmaniero, Gustavo Landauer rekomendis starigon de produkt- kaj konsum-kooperativoj.

Famkonata estas la ekzemplo de pioniroj de koopera-

---

(1) Ni nepre aldonu, ke ankaŭ la izraelia registaro nedubeble kulpas.

tivismo (28 entute, ĉiuj teknikistoj), kiuj en Rochdale (Britio) malfermis kooperativan konsummagazenon. Ĉefajn liniojn de sia entrepreno ili streĉe preparis antaŭ la efektivigado. Ili antaŭvidis akiron de plej necesaj produktoj grandkvante, ĉar multe malpli kostaj ol etkvante en magazeno; ili antaŭvidis aĉeton aŭ konstruon de loĝejoj por la partoprenantoj; ili pristudis eblecon labori por si mem sen devigo suferi konsekvencojn de salajraj leĝoj kaj ties sekvajn malavantaĝojn : labormanko, maldungo, ktp. Ili antaŭvidis eblecon akiri grundon por la kulturo, por la bredado de kortobirdoj kaj brutaro. Resume, ili serĉis vojon, kiu kondukus ilin al komunaj agado kaj laboro en libereca etoso, kaj ili alvokis al ĉies memvola sindonemo. Intensa estis la lukto por transiri ĉiuspecajn obstaklojn, sed ili sukcesis vidi grandparte realigitaj siajn celojn. Kaj de tiu ekzemplo venis granda impeto al kooperativismo, nuntempe disvastigita tra la tuta mondo.

Bedaŭrinde, samtempe necesas rimarkigi, ke, kvankam kooperativismo prezentas liberigan rimedon laŭ ekonomia kaj morala aspektoj, multaj, kiuj uzis kiel idealisman kriterion la kooperativan sociorganizadon, fine ofte burĝiĝis, pro profitamo kaj granda deziro gajni ĉiam pli kaj pli. La obseda ideo pligrandigi la profiton faris el la iamaj laboristoj elementojn gvidatajn de malŝatinda avareco kaj malnobla egoismo. Efektive, homoj, kiuj ne havas sufiĉan moralforton por ekvilibrigi dezirojn, rajtojn kaj devojn, falas en dentradon de sistemo, kiun ili iam kontraŭbatalis. Precize prezentas al ni tiun kriterion unu el la plej kontraŭataj pensuloj nuntempaj, profesoro Herberto Marcuse. En siaj verkoj li substrekas la absorbiĝon, per burĝiĝado de la produktantaj amasoj de la landoj plej evoluintaj, amasoj, kiuj falas en kapitalisman sistemon kontraŭ kiu ili tiom batalis.

En si mem kooperativismo devus speguli mensostaton de siaj naskintoj. Ni konas provojn de kooperativismo realiĝintajn, kaj de kooperativanoj, kiuj kapablis bremsi emon al burĝiĝo kaj fortan profitamon. Tiuj, pro sia etiko, anstataŭ pligrandigi la profiton, prefe-

ris mallongigi la labordaŭron kaj eĉ disponigi parton el la profito por klerigaj, kulturaj, solidaraj taskoj. Ili fiksis al ĉiuj kooperativanoj salajron decan, sufiĉan por kontentigi iliajn bezonojn, kaj tiu salajro estis eĉ pli alta ol se ili estus laborantaj por profito de mastro. Kaj menciinda estas tiu kooperativa horloĝfabriko en Vienne (Francio), kie kolektivanoj ĉiutage dum unu horo ĉesigis laboron por aŭskulti kamaradon legantan kelkajn paĝojn el libroj akiritaj laŭ ĉies deziro. Tiel pere de legado oni klopodis havigi al si pli da konoj kaj samtempe, pliagrabligi la laborhorojn.

En Svedio, Anglio, Francio, en siaj diversaj aspektoj, kooperativoj spertas grandan evoluon; tiun disvolviĝon ni rimarkas ankaŭ en aliaj landoj. Ekzistas kooperativoj,kies konsiderinda ekonomia amplekso bedaŭrinde modifis ilian moralan fundamenton. Dum en la komenco temis pri firmigo de egaleca vivmaniero, poste, pro deziro kreskigi senlime la profiton, konsiderinde pliampleksiĝis la tuto. Pro tio mankis kooperativanoj kaj tiam, same kiel en kapitalista entrepreno, kooperativo dungis laboristojn, produktantojn.

Sed tiuj ĉi ne havis samajn salajrkondiĉojn, samajn avantaĝojn kiel la iniciatintoj, kiuj fine premis la salajrulojn, postulante ĉiam pli grandan produktokvanton.

Ni povas konstati, ke rilate liberigon de salajruloj kooperativoj alportis kaj povos alporti denove, atentindajn kaj valorajn solvojn. Se oni celas socian vivon pli egalecan, nedubeble, ke per kooperativoj povas stariĝi en nuntempa socio kvazaŭ insuletoj, en kiuj oni forigas parton de malegaleco. Kaj nedubeble tiu sistemo de produktado kaj konsumadon montras sekvindan vojon al pliĝeneraligita komforto estonta.

Resume, en kooperativa sistemo elstaras valoraj kvalitoj sed ni kondamnu malindajn deflankiĝojn...pli ol la sistemon mem.

## Liberecana etiko

Unu el la anarkistaj pensuloj, kiuj plej laboris favore al disvastigo de liberecana idealo, estas Armand, kiu eldonis kaj gvidis gazetojn "En dehors" (La Eksterulo), "L'Unique" (Unikulo) k.a., kaj verkis multajn broŝuretojn, librojn pri etiko individuista kaj anarkista. Li klare montris, ke liberecana medio plej ofte konsistas el aro da samcelanoj libere kuniĝintaj, kvankam neniu ano iel komplete povas simili al alia.

Estas fakto, ke liberecanoj, pro siaj sentemo kaj konvinkoj, plej ofte diferencas de la grandega plimulto, kiu ĉirkaŭas ilin. Ili forpuŝas ĉion malracian, maljustan, absolutisman, kion oni trudas al homoj; ili akceptas nek pseŭdan moralon oficialan, nek privilegiojn de iuj malprofite aliajn; ili rifuzas vantecon, frivolecon, lukson, elmontradon kaj ĉiujn hom-malnobligajn sentojn; male de tio, kion oni kutime asertas koncerne anarkistojn, ili ne rifuzas sociordon sed ne akceptas kiel sociordon tion, kio reprezentas por ili soci-malordon, socikaoson. Ili scias, ke ĉiu homo estas tre diferenca de alia homo, kaj ili konsideras, ke ĉiu homo libere rajtas esti konsiderata kiel tuto sed ne kiel ero el iu ajn aro. Tamen, ili scias, ke strebado de multaj samcelanoj ebligas kunagadon kaj starigadon de vere homa sociorganizado kaj konstantan progreson. Ili ne perdu tempon por venigi al si homojn, kiuj ne kapablas senti la belecon, la homecon de ilia ideologio, kiuj ne kapablas ribeli kontraŭ ĉiutagajn maljustaĵojn, kaj kiuj blinde akceptas la "sociajn" antaŭjuĝojn. Ĉar influo de medio kreis ĉe burĝoj, ĉe konkonformistoj, ĉe indiferentuloj, ĉu pro rutino, ĉu pro timemo, kvazaŭ dikan, netraireblan tavolon, kiu blindigas kaj apartigas ilin de etiko liberecana.

Tiun etikon ni juĝas justa, sentas, defendas kaj volas disvolvi. Ni diru ankaŭ, ke multaj, kiuj sin pretendas liberecanoj, ne posedas necesan sentemon, ribelemon, bonkorecon por esti kaj agi kiel vera liberecano, dum aliaj, nekonscie sin kondutas tiel

liberecane, ke tuj, kiam ili malkovras niajn ideologion kaj sintenon, ekhavas la necesan fidon kaj entuziasmon por fariĝi veraj anarkistoj.

Utopiistoj, tion ni ripetu, ni ne estas. Kelkajn trafajn pruvojn ni citis en ĉi tiuj paĝoj. Liberecanoj ne atendas, ke laŭ la proverbo "morgaŭ oni ilin razos senpage". Ekde tuj ili deziras starigi pli justan kaj dignan sociorganizadon kaj eliri el ĉiuj subpremadoj mensaj kaj sociaj. Ili scias, ke feliĉo, plibonigo de vivo atingitaj nuntempe ne sufiĉos morgaŭ. Ili strebas al konstanta plibonigo de la homa kondiĉo. Ni plian fojon akcentu, ke inter ni liberecanoj, laŭ la eblecoj, ni povas starigi nian propran mondon, en kiu ekzistas tiom da diverseco, kiom ni deziras kaj kie ĉiuj homrilatoj : sentimentaj, seksaj, kulturaj, ekonomiaj, disvolviĝas libere. Kaj, realudante Emilon Armand, kiel li ofte ripetis, ni konsideru nin komplete malsimilaj de plimultaj ŝafaroj. Tio tamen ne malhelpu nin, disvastigi ĉiudirekten nian liberecanan ideologion, kies propagandon oni neniel povas kompari al reklamaĵo de fiaj (aŭ bonaj) produktoj, aŭ al iu ajn futila okupeto, ne grava tempopasigilo, k.c.

Necesas, ke same kiel por nia SAT-Sennaciismo, nia anaro pliiombriĝu, por ke efiku nia ideologio. Tiucele ni antaŭenpaŝu kaj .ŝparu nek nian penon, nek nian energion, ĉar de nia konduto, kies ekzemplo povas esti la plej trafa varbilo, dependas la realigado de niaj celoj.

For ĉiujn atencojn al libereco !

Tion neniam forgesu liberecano.

K-do Fontaura.

Noto de la reeldonanto : Tiu teksto estis eldonita de la Liberecana Frakcio de S.A.T. en 1970. Pri la L.F. kaj ties organo "Liberecana Ligilo" informojn donas : K-do P. Persson, Svartviksvägen 14, S 123 52 Farsta.

Johano

GRAV

En

# ANARKISTA SOCIO,

kiel

# KONDUTOS

la

# INDIVIDUO?

Esperantigis kdo 30 151

# E n

# A N A R K I S T A   S O C I O ,

# k i e l

# K O N D U T O S

# l a

# I N D I V I D U O ?

(Tiu teksto estas respondo al la ĉi-supra demando de D-ro TOULOUSE en la gazeto "DEMAIN" - Morgaŭ - de 1.2.1919)

Se mi celus publikon posedantan klaran koncepton pri kio estas anarkio, mia respondo estus mallonga ; sed por publiko, kiu konas ĝin nur laŭ onidiroj, kaj kiu eble aŭdis pri ĝi pli da malbono ol da bono , mi devas pritrakti multegajn flankaferojn, se mi volas doni akcepteblan solvon.

Bele rolas la fabrikantoj de socisistemoj bazitaj sur aŭtoritateco. Nenio ĝenas ilin. Ĉe ĉiu aperanta malfacilaĵo, plia ŝraŭbturno! Ju pli da antaŭviditaj kazoj, ju pli komplika la sistemo, des pli perfekta ĝi estas. Se, poste, en la praktiko, la faktoj montriĝas ne tiaj, kiaj la leĝisto ilin antaŭvidis, kulpas la individuoj en kontraŭdiro kun la sistemo; sed ne ĝi.

Ni, liberecanoj, ne povas pretendi havi rimedon por ĉiu kazo. Ĉar la socia medio, en kiu tiam vivos la homoj, estos ja tute ŝanĝita, kaj ankaŭ ilia men-

so, kaj ĉar kun siaj malavantaĝoj la nova sociordo estos kunportinta ankaŭ proprajn rimedojn, kiujn ni ne povas antaŭkoni.

Unue, mi asertas, ke aŭtoritateco neniam solvis nek kuracis ion. Eble ĝi estas de nia evoluo fazo, kiun ni estis devigitaj travivi - kaj la fakto, ke ĝi regis tiun evoluon, pruvas tion al ni - sed tio neniel pruvas ĝian bonegecon.

Nia aktuala socio kaj la revolucioj, kiuj de tempo al tempo prisemis ties evoluon, amplekse demonstras, ke aŭtoritateco ne estas solvo.

Malgraŭ sia mirinda aparato el policistoj, fidenuncistoj, kaj se bezone la armeo; malgraŭ siaj punlaborejoj, siaj karceroj kaj ties sennombraj gardistoj;malgraŭ terura, ĉiutage kreskanta amaso da leĝoj (leĝoj, kiuj apogas kaj fortigas sin unu la alian...kaj kontraŭdiras sin reciproke), amaso en kiu tiuj, kiuj devas klarigi aŭ apliki ĝin, fine perdas sian reston de sagaco; malgraŭ tiu alia armeo el juristoj, advokatoj kaj el pli etaj robuloj: proceduristoj, notarioj,asignistoj, ktp! - malgraŭ ĉio ĉi, la perfortagoj kontraŭ la proprieto kaj la personoj restas unu el niaj sociaj plagoj, ho ve, nekuraceblaj.

En la "bona malnova epoko", oni pendumis la ŝtelistojn, oni lasis ilin putri en karcero; oni detranĉis iliajn orelojn, ilian pojnon; oni piloriumis ilin,kaj aliaj afablaĵoj, ekzemple la "markado". Oni torturis, vipis, kvaronumis, boligis vivaj la murdistojn; kaj tamen plu okazis ŝteloj, friponaĵoj, murdoj, tiom multaj kiom antaŭe!

Ĉar la leĝo , la juĝisto "bone" punas ("bone" estas nur parolturno!) la kulpulon, sed lasas pluekzisti sam state la kaŭzojn, kiuj puŝis ilin delikti.

Kaj kvankam la deliktulo en karcero ja ne plu povas malbone agi, estas certe, ke li denove deliktos kiam liberigita. Ju pli longdaŭra lia enkarcera periodo,des pli profunda lia demoralizo.

Kiam oni lin pendumis aŭ kvaronumis, oni radikale

malhelpis lin rekulpi, sed ankaŭ tiukaze, ĉar la kaŭzojn oni ne forigis, krimoj kaj deliktoj ne malpliiĝis.

Ĉiuepoke kaj sub ĉiuj reĝimoj, kreskis aŭ malkreskis la nombro da deliktoj laŭ la malbona aŭ bona farto de la individuoj. Tio estas plej klara.

Necesis multe da tempo por atingi tion, sed oni fine komprenis, ke la severeco de l'punoj nenion malhelpas. Kvankam restante tre severaj koncerne la atencojn kontraŭ la proprieto, la punoj iom post iom mildiĝis. Oni atingis leĝon, kiu permesas neplenumon de la unua puno, se la kondamnito ne refalos sub la justican manon.

Se oni komparas la nuntempon kun la malnova epoko, estas certe, ke la krimagoj malpliiĝis. Oni atribuas tiun malpliiĝon al la instruado. Ĉu tio estas vera ? Aŭ ĉu ambaŭ pliboniĝoj ne estus paralelaj, ambaŭ eliĝintaj el la sama kaŭzo: la ĝenerala pliboniĝo de la vivkondiĉoj de tiuj, kiuj disponas nur siajn brakojn kiel ekzistrimedojn?

Aliaj respondu la demandon.

o o
o

Nu, kvankam la laŭdata, glorigata celo de la socio estas, laŭ tiuj,kiuj ekspluatas ĝin, certigi sekuron, liberon kaj bonfarton de la socianoj (kio devus esti , sed efektive estas nur mensogo), tiu socio, male estas bazita sur interes-antagonismo, sur la alproprigo de la produktrimedoj fare de unuj (la malplimulto), kiuj tiel ekspluatas la laboron de tiuj, al kiuj restas kiel elektebloj: malsatmorti, ŝteli aŭ elteni la kondiĉojn de dungisto.

Manlaboron oni malŝatas, konsideras malnobliga. Laŭ la nuna moralo, ĉiu individuo strebu atingi la enviindan situacion ne plu esti devigata mem labori por vivi.

Supre, parazita, privilegia klaso, kiu ordonas,regas, laborigas kaj ĝuas ĉiun eblan komforton, ne sciante kiel uzi siajn muskolojn por pasigi la tempon aŭ

elspezi siajn nepre elspezotajn fortojn. Malsupre,alia malplimulto, kiu vivas en aĉa nescio, suferante mankojn, foje malsaton, dum, sub ĝiaj okuloj, disetendiĝas ĉiuj tentoj de skandale paradanta lukso. Kaj intere, mezklaso, kiu pli malpli bone vivas per sia laboro aŭ per alies, kaj duone kontentiĝas pri sia sorto, tial ke ĝi kredas, ke ne povas esti aliel.

Dividite en regantojn kaj regatojn, en posedantojn kaj neniohavantojn, en ekspluatantojn kaj ekspluatatojn, en vendantojn kaj aĉetantojn, la malnova socio estas bazita sur konkurado; ĝi ne povas naski harmonion, kiu devas esti la celo de ĉiu socio.

Tiu konkurado fatale baldaŭ transformiĝas en veran interes-antagonismon, en kiu triumfas la plej forta,la plej ruza aŭ la malplej skrupula.

Tiel longe dum regos tiu sistemo, estos krimoj kaj deliktoj. Kaj la plej timindaj uloj ne estas tiuj, al kiuj mankas volo.

o o
o

Antaŭ ol klarigi kiel Anarkista Socio povas sin defendi kontraŭ "malsocietemuloj", sen doni detalojn - kiuj necesigus libron - mi tamen skizu la de mi konceptitan organizon.

Starigo de anarkista socio neprigas, ke la grundo, la subgrundo, ĉiuj produktorimedoj, la maŝinaro kaj la tuta ilaro, kiu povas ekfunkcii nur per kolektiva laboro, estu reprenitaj el la individua alproprigo, kaj dis ponigitaj al tiuj, kiuj funkciigos ilin. Ne por ekspluati ilin por si mem, kiel faras la kapitalistaj posedantoj, sed por ĉies plej granda profito.

Per tiu ekonomia transformiĝo malaperas, aŭ preskaŭ malaperas, la politika organizo.

La anarkista socio devas fariĝi densa reto el grupoj, asocioj, bazitaj sur la komunaj interesoj, la komunaj bezonoj de la membraro.

La unuaj bezonoj de socio, sekve de individuoj ( en anarkio, socio havas kiel bezonojn nur tiujn de ĉiuj

siaj membroj) estos certigi la produktadon kaj la konsumadon. La grupoj, kiuj devos plenumi tion, estos ne nur unue organizotaj,sed, laŭ mi, ili devos jam ekzisti embrie en la propagand-grupoj, por ke povu establiĝi la nova sociordo.

Tiuj grupoj, kiuj funkcios ne kiel en la aktuala socio laŭ la principo de "interŝanĝ-valoro",sed laŭ la principo de interŝanĝo de laboro kaj servoj, estos ligitaj inter si por tiuj interŝanĝoj.

La asociiĝo por produkti, por konsumi, kondukas al la asociiĝo por interŝanĝi, kiel mi menciis,sed ankaŭ al la asociiĝo por organizi la transportojn.

Post la precipaj bezonoj venas la flankaj. Kiom da bezonoj, tiom da grup-serioj, laŭ la diversaj konceptoj. Ĉar ia agad-formo sekvigas alian, kaj ĉar ĉiu por labori bezonos la helpon de pli malpli granda nombro da aliaj, la federa formo trudiĝos per si mem.

Ĉar la komerca formo estos forigita, ĉar la intergrupan diverĝecon kaŭzos la volo "fari pli bone" ol aliuloj, kaj ne fikomercaj kalkuloj cele eltiri kiel eble plej el tiuj, kun kiuj oni interŝanĝas, tie ĉi konkurado povas esti nur profitdona por ĉiuj.

o o
o

Se ne plu ekzistas ekonomiaj malhelpoj, la individuon ili ne haltigas. Li povas laŭplaĉe elekti la aktivec-formojn plej bone respondantajn liajn kapablojn. Edukado estos al ĉiuj certigata. Ĉiu povos disvolviĝi laŭ siaj emoj, siaj virtualaj kapabloj. Manlaboro, anstataŭ esti konsiderata kiel malnobliga,estos la socia regulo. Ne utilas diri, ke ĝi estos plenumata en la plej bonaj kondiĉoj.

Sendube, ne ĉiuj malfacilaĵoj estos detruitaj nek venkitaj per starigo de anarkista socio. Sed, kune kun la individua proprieteco, malaperas la plej grava kaŭzo de krimoj kaj deliktoj, honto de niaj socioj.

Sendube, ankoraŭ restus sufiĉe da kaŭzoj de malordo. Ekzemple la pasiecaj krimoj, la individuoj, kiuj, ĉu pro manko de sinregado,ĉu pro natura misinklino ,

havas apartan talenton fariĝi malagrablaj.

Koncerne al la pasiecaj krimoj, la aktuala socio mem estas tre indulgema. Multkaze ties kulpantojn la juĝant aro absolvas, mi ne diros kun gratulo, sed foje preskaŭ.

Ni,anarkistoj, ne pretendas ŝanĝi la homan naturon. Ni povas esperi nur,ke, per pli bona edukado, per pli sana koncepto pri la rilatoj inter individuoj, tiuj las taj lernos esti sociemaj, kaj ke la kverel-kialoj progresive malpliiĝos.

Ni ne pretendas ŝanĝi la homan naturon,sed ni opinias ke ni komprenis ĝin. Tial ni volas la malaperon de socia organizo, en kiu la institucioj favoras kaj disvolvas nur ĝiajn kontraŭsociajn inklinojn.

Ni kredas ankaŭ je la morala progreso de l'homo, ĉar ni estas konvinkitaj, ke edukado, kun favora medio,povas helpi lin superregi siajn egoismajn impulsojn,kiam ili konfliktas kontraŭ aliaj egoismoj. Por tio edukado ne provu inspiri al li stultan altruismon de senĉesaj foroferoj, sed strebu komprenigi al li, ke la libero de homo, kiel sociano, ne absolute estas la libero de la izolulo. Ke, se li volas esti libera en la asocio, li devas respekti la liberon de siaj samasocianoj.

Anstataŭ la aktuala moralo, kiu instruas rapide ekkapti ĉiun atingeblan avantaĝon, ne konsiderante la mal justaĵojn kontraŭ aliaj personoj kaj timante, ke pli rapidaj aŭ pli aŭdacaj uloj forprenos ĝin, ni volas substitui la moralon "ne faru al aliaj, kion vi ne volas, ke oni faru al vi". Ne ĉar tiu aksiomo estas atribuita al tiu hipoteza estulo nomita Kristo - ĝin iu diris longe antaŭ li - sed ĉar ĝi bonege sintezas nian koncepton pri socia moralo.

Sed, oni diros, kion pri la individuoj nekapablaj je sinregado ? Paciencu, mi ĝustatempe tion respondos !

o o o

La homo havas ne nur materiajn bezonojn, sed ankaŭ moralajn, artajn, intelektajn. En tiuj diversaj direktoj kreiĝos grupoj por respondi la bezonojn de tiuj, kiuj esprimos ilin. Tiuj grupoj kontribuos solvi multajn malfacilaĵojn, kiuj nun ŝajnas al ni nevenkeblaj.

Ĉu en la nuna socio, malgraŭ ĉiuj ties malhelpoj kontraŭ la asociiĝemo (malhelpoj juraj, administraciaj kaj ekonomiaj) ne svarmas ĉiuspecaj asocioj pli malpli respondantaj al la celoj - kelkaj mirige bonaj - kiujn projektis iliaj kreintoj ? Ankaŭ en la de mi imagita socio, formiĝos apartaj societoj celantaj antaŭgardi kontraŭ la senpoveco aŭ la entrudiĝo de la Socio kun majuskla S.

Tiam la malfacilaĵoj solviĝos senprocese inter la koncernatoj mem. Ĉar ĉiu povos elekti la al li plaĉantan grupon aŭ organizi kun samopiniantoj tiun, kiu respondos iliajn konceptojn, diverĝoj neniam fariĝos tro akutaj.

Povos formiĝi grupoj ĝuste celantaj helpi por glatigi la malfacilaĵojn, kiujn povus okazigi iuj nesocietemuloj.

Oni rebatos al mi, ke, por glate funkcii, tiu de mi imagita socio devos konsisti el esceptaj personoj ! Ne pli ol la aktuala socio, kiu pretendas, ke la individuoj ne kapablas mem regi sin, kaj kiu, por solvi la problemon, donas al kelkaj la kontrolrajton super ĉiuj. Ĝi donas al kelkaj ĉiujn povojn, instituciojn, kiujn, por ke oni dece uzu ilin, devus uzi anĝeloj - kio povus esti tutsame malagrabla !

Kaj mi nun respondas pri la individuoj, kiujn celas la demando de D-ro TOULOUSE.

Nu, se malgraŭ ĉiuj de la socio ofertitaj eblecoj por vivi en bonaj rilatoj kun siaj najbaroj, tamen ankoraŭ troviĝus tiel "nesociemaj" estuloj, ke ili povus fariĝi danĝero por sia kunvivantaro, tiam tiuj individuoj estus malsanaj aŭ frenezaj. Oni ne leĝodonas por malsanuloj aŭ frenezuloj. Ilin oni kuracas.

Tiukaze, pli bone ol mi, la medicina doktoro TOULOUSE mem konas la taŭgajn rimedojn.

Johano GRAV.

---

Gérant et imprimeur: C. Baudé, F 47 Laroque-Timbaut.
Commission paritaire de presse............. n° 39 863